

E Y R O P A B U L T E N O

Sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri Eýropa Unuiøo

n-ro 16 23-an de aýgusto 2001

Redaktas:

Umberto Broccatelli -

Prezidanto de Eýropa Esperanto-Unio

Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio

u.broccatelli@tiscalinet.it

-u.broccatelli@libero.it

tel./fakso +39-0687135019

Kasisto de EEU:

Hans ten Hagen, ten.hagen.esperanto@wxs.nl

UEA-konto de EEU: eece-p

Tiu aĵi rebulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri *Eýropa Esperanto-Unio (EEU-informilo)* kaj pri la eýropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eýropa unuiøo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (**Eýropa debato**).

Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso *u.broccatelli@tiscalinet.it*, same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento



Esperi pri daýrado de harmonio inter multaj [tatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okaza'oj kaj kontraýiri la sperton akumulitan de la tempo"
Hamilton, The Federalist

Oni povas ricevi la Bultenon en papera formo fariøante "simpatianto de EEU", per sendo de kontribuo de almenaý 20 € jare al la UEA-konto **eece-p**

TTT-ejo de EEU: <http://lingvo.org/eo.html>

EEU - INFORMILO

**KUNSIDO DE EEU-KOMITATO,
en Zagrebo, la 22an de julio 2001**

Æeestis reprezentantoj de la sekvantaj landoj: Aýstrio, Belgio, Finnlando, Francio, Irlando, Luksemburgio, Nederlando, Portugalio, Svislando kaj la Brusela Laborgrupo. Prezidis Katinjo Fetes-Tosegi.

KOTIZOJ. Ankoraý ne pagis la jarkotizon por 2000: Britio, Danlando, Greklando, Italio kaj Portugalio.

EUROSCOLA: la franca reprezentanto raportis pri tiu aĵi granda sukceso. Unuafoje oni parolis Esperanton en la Eýropa Parlamento. La partoprenantoj estis 17- kaj 18- jaraj, de eýropaj landoj, kiel Hungario, Rumanio, Litovio, kaj eæ unu klaso el Kroatio, kiu eæ ne estas kandidatlando por EU-aneco. Bedaýrinde ili venis nur de 3 EU-landoj - Francio, Italio kaj Svedio. Necesos penado por trovi klasojn en la aliaj EU-landoj por la venonta fojo, eble majo venontjare.

EYROPJA JARO DE LINGVOJ 2001: la finna reprezentanto raportis. Estis multe da lokaj agadoj tra Eýropo. La libro "Brilu aĵiu lingvo samrajte" estis eldonita en E-o, franca, germana, hungara, kaj itala lingvoj, kaj tradukita en la aýstra germana. La eýropa Tago de Lingvoj estos la 26a septembro. Aliaj raportis pri agado en siaj landoj - Aýstrio, Irlando.

OFICEJO EN BRUSELO. Estis longa diskuto pri tio. La belga reprezentanto raportis. Necesus 35.000 eýroj jare por minimumo de 2 jaroj por oficejo kun unu laboranto. La plimulto opiniis tian oficejon necesa, pro, ekzemple, la æeesto de la eýropaj instancoj, 4.500 ĵurnalistoj, ktp. en Bruselo. luj havis dubojn pri sendependa oficejo, kaj preferus ke la oficejo funkcii kiel sub-oficejo de UEA, kaj ene de la UEA-buøeto. Unu sugesto estis ke oni nomu ĝin Oficejo pri Lingvaj Rajtoj, kaj ke ĝi okupiøu pri kazoj de klara lingva diskriminacio fare de la eýropaj instancoj, ekzemple, pri anoncoj de postenoj kie oni seræas nur denaskajn angleparolantojn, ktp.

VERONA EEU-KONGRESO, 2002. Oni invitis al partopreno en la venonta EEU-Kongreso en Verono en aýgusto 2002.

PUBLIKA KUNVENO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO EN ZAGREBO

Ne atendite alta nombro da intersemuloj (pli ol 100) partoprenis EEU-kunvenon la 23an de julio, lunde antaŭtagmeze, en salono Velebit. Feliĉe kreskas la interesiĝo pri la "Malnovkontinenta" agado.

László Gados, la aŭtoro de la originale esperante aperinta verko "Brilu ĉiuj lingvoj samrajte", preparolis sian eseon. Tio estis bona oportuno por konigi al la publiko tiun ĉi materialon, kiu origine aperis nur en la reto.

La teksto eldoniĝis jam broŭrforme krom en Esperanto ankaŭ en pluraj lingvoj en- kaj ekster-eŭropuniaj (nome en la lingvoj finna, franca, germana, galega, hispana, hungara, itala kaj serba) okaze de la "Eŭropa jaro de lingvoj 2001".

Anna Ritamäki informis pri EJK 2001 kaj instigis partoprenon en tiu projekto, kies komisiito ŝi estas flanke de Eŭropa Esperanto-Unio.

Al tio rilatis ankaŭ kiel spektakla ero la aranĝo de "Euroscola", pri kio detalojn ni eksciis de Claude Nourmont.

Por havigi al ni fidon pri eblaj okazontaj samtipaj aranĝoj konigis al ni la projekton "Echange" Michael Cwik. Temas pri uzado de Esperanto kadre de ĉemelurbaj rilatoj.

Laŭ opinioj, ke Esperanto bezonus taŭgan informojon en Bruselo (sidejo de Eŭrop-Uniaj instancoj) por gardi lingvan egalrajtecon, plu daŭras la klopodoj por starigo de oficejo tie. Pri tiuj preparlaboroj ni ricevis informojn de Hans ten Hagen kasisto de EEU.

Por havigi bildon pri la klopodoj en estontaj EU-landoj, Oszkár Princz la estro de Kunordiga Komisiono pri Konsultiĝo de Orient-eŭropaj Landaj Asocioj informis la ĉeestantaron.

Por eventualaj demandoj pri EEU-agado turnu vin al la koncize resumanto:

Katinjo Fetes-Tosegi

Sekretario de EEU, roi.esperanto@orf.at

* * * * *

PARLAMENTAJ DEMANDOJ PRI LINGVA DISKRIMINADO

Ni donas la tekstojn de parlamentaj demandoj prezentiitaj de EP-anoj al la Eŭropa Komisiono pri lingve diskriminaj sintenoj de bruselaj oficejoj, kaj respondon riceviton. La tekstoj estas esperantigitaj el la itallingva versio.

Parlamentaj demandoj

SKRIBA DEMANDO E-1682/01

de Bart Staes (Verduoj/ALE) al la Komisiono

(23an de majo 2001)

Temo: Lingva diskriminado ĉe la la oficejo de teknika asistado Sokrates de la Eŭropa Komisiono.

Laŭ la komisionano Diamantopoulou, la kriterio de lingvo denaska povas esti rigardata kiel diskriminanta kaj sekve neakordigebla kun la Eŭropunia regularo teme pri libera cirkulado de la laboristoj en la Unio. Tia pozicio estas esprimita en la respondo al la parlamenta demando E-0779/01 (1) pri la vakaj postenoj de la neregistaraj organizaĵoj, de la entreprenoj kaj de la eŭropaj institucioj, por kiuj estas trudita la postulo de la angla kiel denaska lingvo. En antaŭa tempo ankaŭ la belga ministro s-ino Laurette Onkelinx agnoskis ke la principo de nediskriminado kaj de libera cirkulado de la laboristoj iĝas surtretita per atribulado de vakaj postenoj al angle-parolantoj.

Ŝi baziĝas por tio sur la Eŭropa Deklaro pri la homaj rajtoj kaj sur la Konvencio kontraŭ la diskriminadoj de la Internacia Labor-Organizaĵo.

Pri tio kio rilatas dungojn en la belga federacio, ŝi resendas al la CAO n. 38 (kolektiva labor-kontrakto), al la dekreto Vandezande kaj al la dekreto de la franclingva Komunumo belgia koncernanta la sociajn rilatojn inter la labordonantoj kaj la laboristoj.

En la semajngazetoj "European Voice" kaj "The Bulletin" regule aperas tiatipaj labor-ofertoj.

Laŭpajne, en la eŭropa jaro de la lingvoj, la eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj pli kaj pli ofte postulas

en eksplicita formo, ke iliaj kandidatoj estu denaske anglalingvaj. Tiamaniere ili malkaŭbe diskriminas malavantaĝe al la alilingvaj kandidatoj. La angla lingvo alprenas, pro tiu ĉi motivo, malprave, la statuson de dominantanta lingvo (kulturo). La ne-anglalingvanoj estas krome ekskluditaj el la selekto-proceduro ĉar kiam ilia scio de la angla lingvo estas pli ol kontentiga. Evidente la alilingvanoj ne estas plu allaseblaj por difinitaj funkcioj.

Ne estas imageble ke ankaŭ Socrates, oficejo de teĥnika asistado de la Eŭropa Komisiono, iuŝ kulpa je tia formo de diskriminado ("The Bulletin" de 7/12/00, p. 66).

Ĉu la Komisiono agnoskas ke la oficejo de teĥnika asistado Socrates, pro la fakto ke ĉi rezervas sian vakajn postenojn al denaska anglalingvano, diskriminas damaĝe al ne-anglalingvanoj? En nea kazo, kiel la Komisiono akordigas la principon de ne-diskriminado kun la postulo pri la angla kiel denaska lingvo? Jes-kaze, kian iniciaton intencas preni la Komisiono por ĉesigi tiajn diskriminojn?

(1) GUC

**Parlamentaj demandoj - SKRIBA DEMANDO E-1681/01
de Bart Staes (Verduoj/ALE) al la Komisiono
(23an de majo 2001)**

Temo: Vakaj postenoj ĉe la oficejo de teĥnika asistado Socrates de la Eŭropa Komisiono. En decembro 2000 kaj en marto 2001 la oficejo de teĥnika asistado Socrates aperigis anoncon pri du vakaj postenojn « The Bulletin » (vidu ĉi-sekve) por serĉado de varia dungotaro. La anonco diskriminis damaĝe al la ne-anglalingvanoj kaj ne-franclingvanoj, kiuj estis ekskluditaj el la selekto-proceduro, ĉar en la kazo ke ilia sci-nivelo de la angla aŭ de la franca estus pli ol mezbona. Laŭpajne, alilingvanoj ne estis allaseblaj por tiaj funkcioj. Ne estas imageble ke Socrates, oficejo de teĥnika asistado de la Eŭropa Komisiono, iuŝ kulpa je tia formo de diskriminado. Tial oni petas al la Komisiono respondi al la jenaj demandoj:

1. kiu estas respondeca pri la publikigo de tiuj ĉi diskriminaj anoncoj en "The Bulletin"?
2. ĉu Socrates intencas adopti estontece personar-politikon ne diskriminantan? En nea kazo, kial ne?
3. kiom da kandidatoj estis denaske anglalingvaj?
4. kiom da kandidatoj estis denaske franclingvaj?
5. kiom da kandidatoj estis denaske nek angla- nek franc-lingvaj?
6. kiom da kandidatoj estis studentaj pli ol unu jaron ĉe anglalingva universitato?
7. kiom da kandidatoj estis studentaj pli ol unu jaron ĉe franclingva universitato?
8. kiom da kandidatoj estis studentaj nek ĉe anglalingva nek ĉe franclingva universitato?
9. kiom multaj el la intervjuitaj kandidatoj estis denaske anglalingvaj?
10. kiom multaj el la intervjuitaj kandidatoj estis denaske franclingvaj?
11. kiom multaj el la intervjuitaj kandidatoj estis denaske nek anglalingvaj nek franclingvaj?
12. kiom multaj el la intervjuitaj kandidatoj estis studentaj pli ol unu jaron ĉe anglalingva universitato?
13. kiom multaj el la intervjuitaj kandidatoj estis studentaj pli ol unu jaron ĉe franclingva universitato?
14. kiom multaj el la intervjuitaj kandidatoj estis studentaj nek ĉe anglalingva nek ĉe franclingva universitato?
15. kiu estas la denaska lingvo de la selektita personaro?

(*)La oficejo de teĥnika asistado Socrates, Leonardo & Youth kun sidejo en Bruselo, asistas la Eŭropan Komisionon ... Nuntempe ekzistas la jenaj eblecoj (Viroj/Inoj): asistantoj ... La ĉefaj postulataj karakterizoj estas la lingva scio (denaska lingvo angla, bonega scio de la franca kaj de la germana kaj de unu plia lingvo de la Unio... Administra oficisto... Denaska lingvo angla, bonega regado de la franca aŭ de aliaj lingvoj de la Unio." Bulletin, 7/12/00, p. 66

(*)La oficejo de teĥnika asistado Socrates, Leonardo & Youth ... Asistas la Eŭropan Komisionon ...

Disponas je vaka posteno por fakulo pri komunikadoj (V/I) ... Bonega regado de parolataj angla kaj franca lingvoj... Denaskaj lingvanoj preferataj." Bulletin, 01/03/01, pag. 59

**Parlamentaj demandoj - SKRIBA DEMANDO E-1356/01
de Vitaliano Gemelli (PPE-DE) al la Komisiono
(17an de aprilo 2001)**

Temo: Lingva diskriminado kontraŭ italaj civitanoj.

Rilate al letero al mi sendita de sinjoro Marco Meneghini je dato 18/3/2001, mi demandas, ĉu konformas al la vero tio, kio estas priplendita.

En kelkaj eŭropaj gazetoj aperas anoncoj por kovri postenojn en oficejoj Socrates, Leonardo kaj Junularo en Bruselo, financataj de la Komisiono; tiaj ofertoj bajnas esti turnitaj nur al personoj kiuj estus perfekte, denaske franc- aŭ angla-lingvaj.

Mi volus ekscii, post preciza kontrolo, ĉu tiuj ĉi priplenditaj faktoj estas veraj kaj ĉu pri ili eblas hipotezo de rasa diskriminado surbaze de la lingvo o de la nacieco, kio estas eksprese malpermesata de la belgaj leĝoj kontraŭ rasismo kaj de la artikolo 211 de la Eŭropa Traktato de la Fundamentaj Rajtoj.

=====

E-1356/01IT

**Respondo de S-ino Reding
nome de la Komisiono
(5an de julio 2001)**

La komunuma normaro pri la libera cirkulado de la laboristoj malpermesas ne nur la malkaŝaj diskriminadoj bazitaj sur la nacieco, sed ankaŭ la aplikado de dungo-kriterioj kiuj en la praktiko konsistigas kapitan diskriminadon. La kondiĉoj rilataj al la lingvaj scioj postulataj de la naturo mem de la okupota posteno principe ne konsistigas diskriminadon subaze de la nacieco (artikolo 3, paragrafo 1 de la regularo (CEE) n. 1612/68 de la Konsilio de la 15a de oktobro 1968 pri la libera cirkulado de la laboristoj interne de la Komunumo), sed en la praktiko la aplikado de specifa kriterio - kia la hejmlingvo aŭ la denaska lingvo de la kandidato - cele al taksado de la nivelo de lingvaj scioj, povas estis misproportia rilate al la objektivoj. (verdikto de la Justic-Kortumo de la 6a de junio 2000 en la afero C-281/98).

La organizaĵoj kiuj liveras servojn en la kadro de kontraktoj por la Komisiono, kiaj estas la oficejoj de teknika asistado Socrates, Leonardo kaj Junularo, devas agi en vasta gamo de lingvoj kaj la dungitaro de tiuj organizaĵoj konsistas el vasta gamo de naciecoj kaj de denaskaj lingvoj. Tiuj organizaĵoj povas foje bezoni dungi personojn kun tre alta nivelo de scioj de unu aŭ pluraj specifaj lingvoj. En tiu senco, ili devas respekti ĉiujn jurajn kaj administrajn dispoziciojn kiuj aplikigas en Belgio, inkluzive de la komunuma leĝaro pri la libera cirkulado de la laboristoj, kaj ili estas repondecaj antaŭ la belgaj aŭtoritatoj pri respektado al tiuj normoj.

=====